# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2011




*Kara Leganto, ni jam anoncis pri la forpaso de la eminentaj membroj de nia E-societo: Walter Cebulski kaj Karlo Offutt. Kvankam s-ro Walter forpasis pli frue, sed la funebraĵo okazis fine de Aŭgusto, kvin niaj membroj partoprenis la ceremonion (vd la foton). Restu ili en paco. Nevino de s-ro Vladyslav (Walter) transdonis E-librojn por nia E-societo, dankon! Preskaŭ en la sama tempo s-ro B. Wheel anoncis sin por transdoni E-librojn al la nia E-societo. Pri la E-vivo de s-no Bernardo legu sube. Oni devas anonci, ke ĉi jare ni elektos estraron por la sekvantaj du jaroj. Do, bv fari proponojn. La redakcio proponas por la prezidanteco d-ron Kordylewski. Bv subteni la proponon novembre, en tiu monato ni kunsidos la 15an tagon! Dankon.* –La Redakcio

## Bernardo Wheel: Mia Multlingva Vivo

Mi naskiĝis en 1929 en la franca familio de Vermonto. Nun, estante 82 jara, la mondo por mi aspektas tute alie. Estante knabo, mi eklernis la francan, kvankam miaj gepatroj en la familia rondo parolis la anglan. Mi iris al kolegio en Vermonto, poste en Minesoto, kie germanlingvanoj ĉirkaŭigis min. Magistriĝis mi en Montrealo, uzante la latinan. Mia viv-sperto donis al mi lingvoinklinon.

Kiel katolika pastro mi servis en Vermonto (1956-1969), post tio mi ekloĝis en Ŝikago, kie mi eklaboris kiel librotenisto. En la 1980 interesa artikolo pri Esperanto aperies en Wall Street Journal. Ekzameninte telefonlibron de Ŝikago, mi ektrovis numeron de (vi pravas)... Kent Jones. Komenciĝis mia E-vivo, sur mia E-vojo mi konatiĝis kun multaj interesaj E-istoj, kiel Janet Bixby, Robert Runser, Tina Seastrom, d-ro Kordylewski (vd. foton), Gertrude Novak, Karlo Gunn, bedaŭrinde, forpasintaj Walter Cebulskij and Karlo Offutt, kaj multaj aliaj.

Dum la unua E-kunsido mi aĉetis 1 aŭ 2 E-librojn kaj diris, ke se mi restos E-isto, mi pretos aĉeti po 2-3 ekz. por aliaj gesamideanoj povu akiri ilin de mi. Tiel ekis granda aventuro, kiu daŭris dum 20 jaroj, mi disvendis centojn, milojn da E-librojn.



*Les kaj Bern*

En Ŝikago mi edziĝis kaj mia duono Marie, kiun mi nomas aliĝinta E-istino, kuraĝigis min por multjara E-okupo. Mi amas Esperanton, idealoj de E-istoj estas perfektaj, same kiel la nia E-komunumo. La spirito kaj elsendoj de tiu komunumo, kion Zamenhof nomis kiel la nova sento, faras pli por la mondo kaj justeco. *–Berĉjo Wheel*

## Agrikulturaj Tagoj en Bishop Hill



Ĉiu septembro, Bishop Hill, IL – sveda vilaĝo en Usono, festas Agrikulturajn Tagojn (Jordbruksdagarna). Tie estas ekspozicioj de antikva agrikultura ekipaĵo por plantado kaj por rikolto. Tie okazas montrado de plugilo, tirata de ĉevaloj. En la antikva Kolonia lernejo la virino bakas panon, faras sapon kaj pupojn de maizaj guŝoj. En la parko muzikistoj ludas popolan (svedan) muzikon. Tie ankaŭ okazas popola dancado. Dancistoj portas tradiciajn svedajn kostumojn. Agrikulturaj Tagoj estas grava evento en Bishop Hill. Alia eventoj estas Somermezo en Junio kaj Kristnaska bazaro en Decembro. Ĉe Kristnaska bazaro infanoj pentras elfojn

kaj tie troviĝas “julbuk”. En la butikoj knabinoj pentras “Lucion”. Ŝi portas blankan robon, ruĝan skarpon kaj kronon kun kandeloj. Ŝi disdonas kuketojn al la vizitantoj. Bishop Hill havas multajn festavalojn. Ĝi estas peco de Svedujo en Usono.

*–Joelo Bjorling*

## Tutmondo Ŝikage

La giganta pastelkolora statuo de Marylin Monroe, starigita laste ĉe la fama “Magnificent Mile” en Ĉikago, allogas la multnaciajn turistojn. Multaj trapasantoj ne rimarkas, ke la apuda domego de “The Chicago Tribune” posedas sur siaj muroj alian tre interesan, internacie gravan vidindaĵon – la unikan kolekton de ŝtonoj, venigitaj de la tuta mondo. Ĉiun ŝtonon akompanas subskribo, tiel la kolekto fariĝas originala geografie-historia ekspozicio…

Do, elektu vian ŝtonon kaj preparu vian rakonton por la oktobra kunveno, dankon!!! *–Leszek Kordylewski*

## 100,000 EUR por ESF!

Por festi la registriĝon de la 100.000-a uzanto de lernu.net, la lernu!-teamo kunlabore kun E@I lanĉis donac-kampanjon por subteni Esperantic Studies Foundation (ESF). La celo estas kolekti 100.000 eŭrojn por ESF antaŭ la 15a de Decembro 2012. “Sen ESF Esperantujo ofertus malpli da servoj al esperantistoj kaj al tiuj, kiuj volas lerni Esperanton.” Tiel klarigas la lernu!/E@I-teamo sian deziron helpi al ESF daŭrigi sian bonan laboron. “Tio estas tre ambicia tasko”, agnoskas la teamo, “sed ĝi povas esti realigita, se multaj Esperantistoj subtenos tiun iniciaton”. Speciale por tiu ĉi kampanjo la teamo funkciigis retpaĝon http://kampanjo.ikso.net.

Fondita en 1968, ESF fariĝis unu el la plej grandaj investantoj en la modernan Esperanto-komunumon, kaj eĉ se relative malmultaj aŭdis pri la fondaĵo mem, esperantistoj ĉie en la mondo povas ĝui la fruktojn de ĝia laboro. Multaj grandaj kaj konataj projektoj ricevis financan helpon de ESF, inkluzive retpaĝojn por antaŭenigi studadon de Esperanto, programojn pri instruado de E-o en lernejoj kaj trejnado de E-instruistoj.

Multaj konataj esperantistoj jam esprimis sian subtenon al la donackampanjo. Mark Fettes, vic-prezidanto de ESF kaj iama estrarano de UEA, rimarkis: “Kun la reta epoko, nia mondo malkreskis, kaj multege kreskis la eblecoj rapide komuniki, decidi kaj agi. Iom post iom nia tuta movado devos adaptiĝi al tio, sed ESF jam montras la vojon, subtenante promesplenajn iniciatojn sur la kampoj de edukado, scienco kaj teknologio. Se vi donacos al ESF, vi povos esti certa, ke via mono uziĝos por konkretaj projektoj, bone mastrumataj, kiuj altigos la prestiĝon, videblecon, kaj uzindecon de Esperanto en epoko de tutmondiĝo.” *–Inf. ESF*

## La 97-a Universala Kongreso!

La 97-a Universala Kongreso de Esperanto okazos la 28an de Julio – 4an de Aŭgusto 2012 en Hanojo, Vjetnamio. Jam aliĝis 76 personoj el 34 landoj. Bonvenon!

**http://www.uea.org/kongresoj**

*-Preparis V. Pajuk*




**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

**Estraro:**

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

25an de Oktobro – Tutmondo Ŝikage (gvidas D-ro Kordylewski), bv prepari informon pri la etnaj anguloj de nia metropolo

22an de Novembro – reelekta kunsido, gravaj organizaj demandoj kaj planoj por la estonta agado estos pridiskutataj, bv prepari prelegetojn

18an de Decembro – Zamenhofa Tago’11 sur Ŝuista placo de Malnova urbo (Cobbler Square, 1350 N Wells St., Old Town)